# LA VERDA LUPEO FENĪKSO

**N-ro 54** **1981 Oktobro** **12a jaro**

Redaktoro:
R. Burmeister, DDR 9047 Karl-Marx-Stad, W.-Firl-Str. 30





## Nia nova Esperanto-poŝtmarko

| | |
|---|---|
| Eldontago: | 26 julio 1981 |
| Eldonkvanto: | 1,5 milionoj |
| Nominalo: | 7 Reis |
| Koloroj: | verda/griza/nigra |
| Folio (paĝo): | posedas 50 markojn |
| Tekstoj: | 66a Universala Kongreso de Esperanto<br>66a Congresso Mundial de Esperanto |
| Bildoj: | Esperanto-stelo inter du turoj |

Poŝtaj UTK kun dorsflankaj numeroj (mia 23286).
La pm estas surstampita per nuliga unuataga stampo kun la teksto:
Primeira Dia de Circulacao-Brasilia-DF-26 Jul 81
Apud la pm situas poŝta memoriga stampo en diametro de 31 mm kaj tekstas:
66a Congresso Mundial de Esperanto
26a 31/7/81 ECT Brasilia DF
En la mezo de la stampo Esperanto-stelo
La surpresita teksto sur UTK
66a Congresso Mundial de Esperanto
1a dia de circulacao
Empresa Brasileira de Correios e Telegrafos

**UK-salutojn**
la redaktoro ricevis de niaj klubaj geamikoj Elizabeta kaj Rikardo Hirsch, de Eluizio Bueno Rodriguez, de Werner Bormann kaj de Angel Segura Peralta. Koran dankon!

El la ricevitaj bildkartoj eblas konkludi, ke la brazila poŝto nur 26an de julio disponigis la novan E-stampon. La salutkartoj de la aliaj tagoj portas iujn terure fuŝitajn violinkajn normalajn poŝtajn stampojn de AG Central'Brasilia 29.7 kaj Tratamento 28.7 ktp.

Certe nia kluba amiko Hirsch ankoraŭ sendos raporteton pri la filatelaj cirkonstancoj dum la UK?

Cetere mi povis ankaŭ konstati, ke oni surpresigis plurajn bildkartojn kun Esperanto-tekstoj.



## Novaj GDR-E-pk

### 3-a IMEK

Okaze de la "III-a INTERNACIA MEDICINA ESPERANTO KONFERENCO 15–19.7.1981 en Ruse, Bulgario" la Medicina Fakrondo ĉe EA de GDR aperigis novan surpresitan pk kun supra teksto en ruĝa. Neuzitaj estas apenaŭ troveblaj, ĉar la preskaŭ tuta stoko ricevis poŝtajn E-stampojn kun portreto de Richet okaze de la 3-a IMEK. La stoko de tiu pk ŝajnas esti ege malgranda, tamen tiuj, kiuj pasinte jam montris intereson, ricevis tiun pk rekte de d-ro Brosche. Li informis letere la redaktoron, ke vere kurintaj poŝtkartoj de tiu nova speco ekzistas nur kelkaj dek.-senditaj de li al diversaj kolektantoj, al IMEK kaj al si mem. La kaŭzo estas fuŝlaboro kaj malatento de la poŝto. La ministerio en Berlino ne donis sciigon al poŝtejo en Finsterwalde pri la reuzo de la Richet-stampo dum 1.7. Nur post protesto de la mendinto oni en la poŝtejo aplikis la stampon kun dato de 1.7. entute sur ĉ. 60 pecoj. Aliaj poŝtaĵoj ne ekzistas kun tiu stampo. Eble tio estas interesa etaĵo por kelkaj specialistoj.

### 1300 jaroj Bulgario

La Leipzig-a Laborrondo Esperatno aperigis filatelan tutaĵon (kat. C) dediĉe al la jubileo de la bulgara ŝtato kun ruĝa surpreso

1300 Jaroj Bulgario

Porokaza germanlingva poŝtstampo, ankaŭ mendita de sama E-grupo, funkciis en ĉefpoŝtejo de Leipzig en septembro 1981. Tiu tutaĵo kun stampo estas ricevebla ĉe:

Rolf Beau, Jacobstr. 9, DDR 7010 Leipzig kontrau 2 IRK.

## III-a IMEK

La 3an Internacia Medicinistan Esperanto Konferencon, kiu okazis 15–19.7.1981 en bulgara Ruse, partoprenis ĉirkaŭ 250 personoj. Ni nur pritraktu filatelan aspekton: En GDR aperis tiu memoriga poŝtkarto kun nominaloj de 10 kaj 25 fenigoj, kaj krome ankaŭ poŝta memoriga stampo kun la teksto

"III. Intern. Med. Esperanto-Konferenz, 15–19.7.1981 in der VR Bulgarien"

Tiujn du filatelaĵojn iniciatis la medicina fakrondo en GDR. Krome ĝi aperigis normalajn kovertojn kaj kartojn kun samaj surpresoj, tiujn oni povis akiri en la konferencejo.

1. = emblemo de IMEK, kiu montras nur kalikon kun serpento,
2. = emblemo de IMEK, kiu montras kalikon kun serpento en terglobo, plie verdan stelon k bulgaran mapon kun 1300 (jaroj Bulgario) = (kion hazarde mi scias).

Je dispono estis gumstampo de LKK. Pro ĉiuj tiuj informoj ni kore dankas al d-ro Brosche, kiu partoprenis tiun konferencon.

## Bacon-pm de New Foundland

Nia kluba amiko Stifter informas pri tiu poŝtmarko, pri kiu skribis jam Bartoŝik: Eldondato estas 15 aŭgusto 1910, dentumo 12, numero laŭ katalogo Stanlay-Gibbon 100 kaj 100a. Ekzistas du variantoj. Numero 100 kostas 50 pundoj neuzita kaj 48 uzita. 100a kostas 17 pundoj neuzita kaj 16 uzita. Numero 100 havas en la vorto "colonization" renversitan literon "z". 100a estas kun korekta litero "z". Laŭ Yvert-katalogo estas numero 77 kaj alian ne mencias, ĉar Yvert sole mencias malmultekostan poŝtmarkon. Yvert-prezo ne konata, ĉar je dispono nur estis sufiĉe malnova katalogo.

Dankon, amiko Stifter! Utilaj estas tiaj sciigoj por la Esperanto-filatelistoj. Certe vi jam ricevis la poŝtkartojn pri la 2-a konferenco de la medicina fekrondo, eldiro Platon kaj Richet?

## E-pm plej grave?

Esperanto Ligo Filatelista praktikas la Esperanto-Filatelon en komplekso. tial ne estas tiel, ke por ni la Esperanto-poŝtmarkoj estas la "plej grava". Por nur kolekti E-pm ni ne bezonus nian ELF-AREK. Ili nur havas eĉ duarangan gravecon. Por ni gravas esplori kaj serĉi ĉiuspecajn poŝtajn dokumentojn, kiuj rilatas iel al nia Esperanto, aú al alia internacia lingvo. Por vera filatelisto povas esti ekzemple multe pli valora letero sendita de New Foundland afrankita kun tiu Bacon-pm ol tiu multekosta jugoslava E-pm. Ni devas dediĉi nian atenton nepre ankaú al surpresitaj kartoj kaj kovertoj, kiuj cirkulis tra poŝta vojo.

Kaj pri ĉiuspecaj tutaĵoj, stampoj, rekomarkoj ktp. Certe eblas montri en filatela ekspozicio ekspozaĵon pri ĉiuj E-pm, tio tamen hodiaú jam ne havas voloron, ĉar medalon per tio ne eblas akiri. Mi parolas pri ekspozicioj, kiuj okazas laú FIP-regularo.

Ni nepre devas prezenti alton kvaliton al la ekspozicioj, kaj ni ĉiuj tion povus fari, ĉar ni havas la avantaĝon esti internacie organizitaj kaj ni povas reciproke nin helpi, kion parte ni ja praktikas helpe de nia informilo.

Nia celo estas, en filatelaj rondoj efike disvastigi kaj popularigi (propagandi) Esperatnon, tion ni povas pere de filatelaj ekspozicioj, kiuj kutime havas milojn da vizitantoj, aú ankaú pere de filatelaj kluboj naciaj k filatelaj revuoj.

Estas bedaúrinde ofte tiel, ke bonaj iniciatoj fakte vaporiĝas senefike. Ni presigas E-kovertojn, iniciatas E-stampojn, sed tiuj cirkulas nur inter Esperantistoj. Poŝtisto tute ne rigardas al pm aú stampo aú surpreso, por li nur gravas la adreso. Kaj tial ni devas montri nian materialon en ekspozicioj, kaj ne meti en iun albumon por propra plezuro.

Kie trovi E-pm, tio tamen gravas por kelkaj. Unue vi devas amikiĝi kun tiu penso, ke ne eblas fariĝi "kompleta". Due vi devas ilin ne serĉi ĉe niaj Esperantistoj, sed en la filatela medio: en filatelaj kluboj, aúkcioj, gazetoj kaj en la magazenoj. Kutime la Esperantistoj apartenas kaj apartenis al "malriĉaj" homoj, kiuj ne povis akiri "sufiĉan kvanton".

Tamen vi kompreneble ankaú pere de interŝanĝo kiun iu el niaj klubaj geamikoj trovos iujn E-pm. Aú eĉ plie: vi rajtas ĉiuj senpage anonci en nia informilo viajn dezirojn. Sendu deziritan tekston al la redaktoro.

## Stampo en Malmö

Okaze de kongreso de Sveda Esperanto Asocio kaj de la 75a jubileo de la Esperantoklubo en Malmö la sveda poŝto uzis de 6–8 junio 81 memorigan poŝtan stampilon (nuligan). La motivo prezentas la urban pordegon, silueton de Malmö k E-stelon. La teksto de la stampo:

SVEDA ESPERANTO KONGRESO /75-JARA JUBILEO/ SEF KEM
SEF = Sveda Esperanto Federacio
KEM = Klubo Esperantista de Malmö.

Temas pri gumstampo "Mö 1 OF 1980:183"
Tiujn sciigojn ni prenis el "Postverkets Cirkulär – Filateli Nr. 25 – Maj 1981", informilo de sveda poŝta ministerio, kiu ankaú prezentis bildon pri la stampo. Modela kaj konkreta informo. Dankon al geamikoj Strönne, Paulsson k Lindström kiuj peris la informojn.

## 66ª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La Internacia Lingvo Esperanto estis kreita de la pola kuracisto LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF (1859-1917), por fariĝi la dua lingvo de ĉiu nacio.

Prezentante gramatikon simplan, el nur 16 fundamentaj reguloj, Esperanto estas facila, logika, fleksebla kaj belsona. Ĝia leksikono entenas plejparte vortojn komunajn al diversaj lingvoj antikvaj kaj modernaj, kaj ĝuste tial rekoneblaj je unua rigardo de ĉiu meze klera persono.

Ekde ĝia publikigo (1887), Esperanto trovas ampleksan akcepton en ĉiuj landoj. En Brazilo, ekzemple, ĝi komencis disvastiĝi tuj post tiu dato kaj en 1907 estis fondita Brazila Ligo de Esperanto, en Rio de Janeiro; poste, naskiĝis Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kaj lastatempe fondiĝis Brazila Konsilantaro de Esperanto, krom dekoj da kluboj kaj lokaj asocioj tra la tuta lando.

Uzata efike ĉe perletera korespondado, Esperanto multe kontribuas al la proksimiĝo reciproka de la popoloj.

Esperanto estis ĉiam apogita de la oficialaj instancoj de Brazilo. La Brazila Poŝto estis unu el la pioniroj en la mondo, kiuj adoptis ĝin kiel lingvon uzeblan ĉe komunikado, dank' al la tiama Ministro Lauro Müller. La antikva Departemento de Poŝto kaj Telegrafio emisiis sep poŝtmarkojn koncernajn al Esperanto kaj Zamenhof.

Kiel rezulto de longa kaj pacienca laborado de propagando farita de miloj da Esperantistoj, UNESKO, en sia Ĝenerala Konferenco de 1954, agnoskis la valoron de Esperanto, rekomendante ĝian diskonigon flanke de la Ŝtatoj-membroj.

Universala Esperanto-Asocio (nun konsulta organizo rilate UNESKON), fondita en 1908, kun sidejo en Roterdamo, Nederlando, estas la plej alta kunordiga instanco de la Esperanta movado. Ĝi havas anojn kaj aliĝintajn asociojn en pli ol 90 landoj.

Ekde 1905, ĉiujare realiĝas Universalaj Kongresoj, en plej diversaj landoj.

La 66ª Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazas en Brazilio de la 25-a de julio al la 1-a de aŭgusto, prezentas kiel Altan Protektanton Lian Moŝton la Prezidenton de la Respubliko João Figueiredo kaj estas apogita de eminentaj aŭtoritatuloj. La unuan fojon tia evento efektiviĝas en la Suda Hemisfero, kunvenigante en ĉi tiu parto de la mondo centojn da inĝenieroj, kuracistoj, sciencistoj, ĵurnalistoj, verkistoj, profesoroj, komunikistoj, entreprenistoj, ktp, batalantoj de la nobla idealo doti la mondon je valorega komunikilo: lingvo facila kaj viva, kapabla favori la komunikadon inter malsimilaj popoloj, sen la malfacile venkebla bariero de la lingvaj diferencoj. La ĉefa temo de la kongreso (Kulturoj kaj Lingvoj — Pontoj kaj Barieroj) estos debatita en monumenta festo de homa kunfratiĝo.

Farante ĉi tiun poŝtmarkan emision, la Brazila Entrepreno de Poŝto kaj Telegrafio kontribuas, alifoje, por akceli la disvastiĝon de Esperanton en Brazilo kaj eksterlando.

SENATANO JOSÉ LINS ALBUQUERQUE
Prezidanto de Loka Kongresa Komitato








KULTURBUND der DDR
Leipziger Arbeitskreis
Esperanto
DDR - 7010 Leipzig
PSF 713




p.f. 1450 ☎ 05251-27612






## Glumarka anguleto

**Helpu al la lepruloj!**

Samideano doktoro J. KOndor iniciatis antaú jaroj E-glumarkojn kiuj tre populariĝis en la Esperantomondo. La vendado de ili dum lastaj 5 jaroj alportis sumon de 17.000 gmk. Tiun sumon la Johane-Gimnazio en Oberlahnstein disponigas por kuracado de lepruloj en Afriko. Tre bona afero, ĉar lepro estas unu el plej kruelaj malsanoj: forputras manoj k gamboj k eĉ la vizaĝo. Tial ni varme povas rekomendi la distribuadon de la novaj glumarkoj. En ĝia mezo ni vidas la terglobon kun la verda Esperantostelo kaj kun la kruco. Sube ni vidas du ruĝajn manojn en oraj manikoj, kiuj volas simboligi helpemon. Unu folio posedas 32 markojn. Bedaúrinde mi ne konas la prezon, sed mi havas la adreson, kie ĝin povi akiri:

Johannes Gymnasium, D 542 Lahnstein

**Tremon rompis silentadon**

Nun la redaktoro ricevis leteron de la kluba membro Tremon, kiu sendis plurajn informojn. Li preparis "aldonon por la Jensen-katalogo de Esperanto-glumarkoj 1972–1978" kaj listojn provizorajn pri E-glm ĝis 1981. Havebla tiu materialo estas kontraú 10 IRK, aú 30 malsamaj E-glm, aú 60 samaj E-glm. Li demandas publike: Kiel malglui memglueblajn glumarkojn gluitajn sur kovertoj? Mi povas respondi, ke malglui memglueblajn glumarkojn gluitajn sur kovertojn plej verŝajne ne eblas. Eltranĉu.

Tremon ankaú rekomendas katalogadon de kartoj kaj kovertoj kun E-tekstoj aú emblemoj. Tio kompreneble tute ne estas ebla ĉar ekzistas miloj da, krome montriĝis, ke la kolektantoj simple ignoras petojn, doni informojn pri ili.

## Bonvenon en nia Amika Rondo!

Lastatempe aliĝis vico da novaj klubaj membroj, kiujn kore ni bonvenigas. Ni esperas, ke ili restu fidelaj al ni kaj ke ili ĉiuj aktive kunlaboru en nia informilo. (Informi redaktoron pri novaj materialoj). Ni ankaú esperas, ke ili ĉiuj antaúe informiĝis pri la karaktero de nia klubo, do, ke ni okupiĝas nur pri Esperantofilatelo, kaj iom apude pri glumarkoj, insignoj kaj ceteraj bagatelaĵoj, kiuj tamen feliĉigas kolektantojn.

- Sinjoro Taiei Nakai, Motosiro-cho 19-22, Fuzinomiya-si, 418 Japan.
  Li skribis, ke ŝatas filatelon.
- Sinjoro Andre Laverre, 12 Rue Keufer 12, F-75013 Paris.
  Ofte partoprenas ekspoziciojn, preparas E-ekspozaĵon.
- Sinjoro Louis Bertrand, Rue des Déportés 102, B-4800 Verviers, Belgio
  Li estas maksimafilano, kolektas "La Biblio", "Malnova kaj Nova Testamentoj", kaj "Esperanto en la MK". Bonvolu klarigi al redaktoro, kion vi komprenas sub "maksimafilio", ekzistas div. opinioj pri ĝi en la mondo. Normale, ni tion scias, temas pri bildkarto kun sammotiva poŝtmarko k sammotiva poŝtstampo sur bildflanko.
- Sinjoro Tage R. Olsson, Vitabandsvägen 13, S-302 40 Halmstad.
  Ne skribis detalojn.
- S-ino Terttu Österman, Raatihuoneenk 3.A.19, SF-2410 Salo 10.
  Havas intereson akiri stampokatalogon kaj stampojn el la stampobanko.
- Sinjoro M. Michel Paquis, 8, rue Gabriel Pelletier, Cheminon, F-51250 Sermaize les Bains.
  Ne skribis detalojn.

Ni petas ĉiujn niajn novaj klubanojn, kontakti redaktoron kaj sendi al li eventualan deziron pri (senkosta) anonco en nia informilo.

## Filatelista renkontiĝo en Valtice

La anoncita renkontiĝo tamen lastmomente okazis. El nia klubo partoprenis la amikoj Kosieniak, Straif, Vana, Burmeister kaj Hasala, kiu organizis la kunestadon. La kondiĉoj de tiu renkontiĝo estis idealaj, malmultekosta hotelo kaj prezoj en luksa restoracio tre malaltaj. La ĉirkaŭaĵo estis absolute romantika, kaj eĉ la najtingaloj ĉiunokte donis koncertojn. La tuto okazis en vera kastela parko rekte apud landlimo al Austrio. Sinjoro Hasala proponis ĉiujaran tian renkontiĝon. Por ŝatantoj de Prazdroj – kaj Budvarbieroj estas rekomendinde, veni jam du – tri tagojn antaŭe. Sed ankaŭ ŝatantoj de sudmoraviaj vinoj tie troviĝas meze inter amaso de vinkeloj. La tute tre rekomendinda. Mi tutcerte denove iros sekvontjare en marto kaj esperas, ke jam pli frue ol ĉifoje la organizanto komencu organizadon, por ke iom pli da ĉeestantoj estu tie.

## Niaj ekspozantoj aktivas:

Doktoro Brosche pereparis novan ekspozaĵon "Nervo kaj animo", sian unuan filatelan ekspozaĵon kaj tuj akiris en altranga ekspozicio medalon en ora rango. Kore ni gratulas al li kaj esperas, ke li ankaŭ dediĉu tempon al preparo de ekspozaĵo pri Esperanto aŭ simile.

## E-pm-banko?


Angel Segura proponas fondon de E-pm-banko, sed tio certe ne necesas, ĉar nia stampobanko ja ankaŭ peras E-pm, se ĝi disponas pri ili. Kompreneble ne estas facile, akiri ekz. jugoslavajn, triejstajn, bavaran aŭ brazilajn malnovajn E-pm, tial nur eblus servo pri relative novaj E-pm. Eble nia amiko Werner Heimlich povas fari proponojn? Al nia amiko Segura mi povas diri, ke mi bezonis 20 jarojn por akiri ĉiujn E-pm, eĉ nun mankas iuj nestampitaj (ekz. Leningrado). Segura plie skribis, ke li intencis akiri de nova brazila E-pm "sufiĉan kvanton", por eventuale interŝanĝe proponi ilin al la membraro.

## Kaj informas

"Mi posedas afrankstampojn de Antwerpen el la jaro 1980 kun tekstoj:
- Esperanto-Centrum (F. 3640)
- Esperanto Panorama "
- l'Esper. en Marche "
- JEN/Koncize "

kaj afrankstampon de Brasschaat 2130
- TK – STAFETO (C. 2285)

Kara Mikaelo Legris, estu feliĉa: mi nek posedas nek iam vidis aŭ ĝis nun aŭdis pri tiuj afrankstamoj. Bv. sendi specimenojn aŭ almenaŭ fotokopiojn por povi doni pliajn detalojn al niaj klubaj geamikoj! Dankon pro donitaj informoj ankaŭ pri aliaj stampoj!



**Amouroux-aj rimarkoj:**

Nia kluba amiko denove kontrolis sian kolekton kaj faris jenajn konstatojn:
BRA 10 mi havas kun la nuliga stampo de 25.12.1940 . . .
GFR 12 mi havas kun dato de 2.7.1962 . . .
BU 5-2 mi havas kun nuliga datstampo de SOFIA sen sekva litero . . .

Rimarko de redaktoro: Do, eĉ specialkatalogoj pri brazilaj stampoj ne donas korektajn informojn. En nova katalogo ni korektos la datojn.

GFR 12 kun dato de 12.7 ne estas misdato, verŝajne la poŝto reuzis aŭ, ankoraŭ uzadis tiun memorigan poŝtstampon.

BU 5-2 aperas kun multaj diversaj nuligaj datstampoj, pri tio ni atentigos en postnoto en nova katalogo.

Amiko Amouroux plie skrivas pri la Perpignan-1981-stampo: La koncerna E-stampo estis uzita de la 2-a de marto ĝis la 8-a de junio. Ekzistas ĝi kun nuliga kaj P.P.-datstampoj kaj, ambaŭtipe, tre sporade, kun asterisko (steleto *) anstataŭ horindiko en la datstampo. Ankaŭ, kelkfoje mankas la tagdato sub la tekstoparto, aŭ, ĉu tute ĉu parte, eroj de la datstampo estas inversitaj.

Rimarko de redaktoro: Tiuj variaĵoj montras, ke la poŝto vere uzis tiun maŝinstampon dum la tuta tempo kaj ke la investita sumo de la mendinto ne estis superflue elspezita. Aliflanke tiu monto da variaĵoj montras la problemecon de katalogado, kion noti kaj kion ne!

## Resumo pri novaj stampoj

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| GFR 31 | Paderbon | 1978 15–22.9 | Servo per amikeco | |
| GFR 32 | Koblenz | 1980 | Servo per amikeco | |
| FRA 45-1 | Cerny | 1979 31.3 | E-Philatelie | 36 |
| FRA 45-2 | Draveil | 1981 14.3 | E-Philatelie | 36 |
| ITA 32 | Manfredonia | 1980 8.9 | 51a nacia E-kgr | 38 |
| ITA 33 | Lucca | 1980 28.9 | E-ekspozicio | 38 |
| BRA — | Sorocaba | 1980 12.12–16.12 | E en radio | 31 |
| BRA —* | Sorocaba | 1980 15.12 | APE-Concurso | ? |
| GDR 11 | Finsterwalde | 1981 5–12.1 | IMEK 3a | 40 |
| | | 1.7 | reuzo | 40 |
| BRA — | Sorocaba | 1981 21.2–27.2 | Semajno de amikeco | 31 |
| FRA 46-1 | Perpignan | 1981 2.3–8.6 | Nacia E-kgr | ms 49x22 |
| 46-2 | Perpignan | 1981 2.3–8.6 | sama, sed kun P.P. en ds – ambau kun k sen horo | ms 49x22 |
| GDR 12 | Leipzig | 1981 13–15.3 | IFER 81 | 40 |
| POL 122 | Katowice | 1981 4.4 | Nacia E-kgr | 45 |
| HUN 77 | Szombathely | 1981 4.4 | Junulara E-renkonto | 33 |
| GDR 13 | K-Marx-Stadt | 1981 16.4–24.5 | Laborista E-Movado | vi/ni 40 |
| GFR 33 | Regensburg | 1981 16.5 | IFEF-kgr 33a | ovala 45x34 |
| SVE 25 | Malmö | 1981 6–8.6 | Sveda E-kgr | 30 |
| HUN 78 | Pecs | 1981 4.7 | Fervojista E-renkonto | 40 |
| HUN 79 | Gyula | 1981 6.7 | SEU 19a | — |
| MEK 1 | Mexico | 1981 10.7 | Int. Junulara Kgr 37a | 32 |
| HUN 80 | Gödöllö | 1981 13.7 | ILEI-Konferenco 15a | 35 |
| HUN 81 | Abaliget | 1981 20.7 | IREN 14a | 34 |
| BRA — | Brasilia | 1981 26.7 | UK 66a | 31 |

## Hungario kun novaj stampoj

Nia kluba amiko Fekete sciigis la redaktoron pri uzado de jenaj novaj poŝtaj Esperantostampoj en Hungario:

**Pecs** (pron. peĉ)
LANDA FERVOJISTA RENKONTO plus hungarlingva teksto tekstas tiu stampo, uzita 4an de julio en urbo Pécs. En la stampo plie aperas televida turo k E-stelo. Diametro estas 40 mm. Tiu stampo ricevis katalogan numeron HU 78.

**Gyula**
De 5–11.7. en Gyula okazis la Somera Esperanto Universitato. Organiza Komitato denove aperigis la malnovan stampon. Eble mankas ideoj? Por filatelistoj estas vere enuiga, ĉiujare renkonti la saman stampobildon. Krome la stampoteksto kiel kutime ne estas legebla por fuŝa apliko de la stampo. Tiu stampo ricevos numeron HU 79.

**Gödöllö**
En tiu ĉi loke kun tiu stranga nomo, kiun oni eble pron. gedele, okazis la 15a konferenco de ILEI, kiel tekstas la ankaŭ hungarlingva poŝta stampo. En ĝi ni renkontas la E-stelon kaj la vorton HUNGARIO. La stampo havas diametron de 35 mm kaj ĝi ricevos la katalogan numeron 80.

**Abaliget**
De 20–29 julio ĉi-jare okazis tie la jam "14a INTERNACIA RENKONTO NATURAMIKA". En la stampo aperas floro kaj E-stelo. La stampo havas diametron de 34 mm kaj ricevos katalogan numeron HU 81.

Ni dankas ankaŭ al amiko Radnai pro senditaj informoj. Kio tamen mankas, estas informoj pri eventualaj kovertoj, kartoj insignoj, kaj glumarkoj. Ne konataj estas same la datoj de uzado.

## Meksikaĵo

La Esperanto-filatela suno nun leviĝis ankaŭ en Meksikio kaj laŭ letero de Angel Segura al Paulsson la poŝto de Meksikurbo uzis la 10an de julio 1981 Esperantostampon. Ni esperu, ke nia meksika amiko akiris sufiĉan kvanton da stampoj por niaj membroj k provizis nian stampobankon.

Sinjoro Segura informis, ke li iniciatis, desegnis kaj petis de la aŭtoritatoj tiun stampon. Okazo: 37a Internacia Junulara Kongreso, 10–17 julio 1981 en Oaxtepec. Uzita la stampilo estas nur dum la inaŭgura tago 10an de julio.

Subtenon li ricevis de la Meksikurba Filatela Asocio (AMEXFIZ). Bedaŭrinde mi (redaktoro) ankoraŭ ne vidis tiun stampon kaj ankaŭ ne ricevis informojn pri eventualaj kovertoj, poŝtkartoj aŭ glumarkoj. Sekve mi ne povas informi la klubajn geamikojn pri tio.

## Legris korektas


"Mi legis vian lastan "Fenikson" kaj trovis du erarojn: LUK 1 estas Clarivaux de 1972, LUK 2 tiu de 1978. Krome vi donis erare n-ron 31 al Koblenz 1981".

Dankon, ni tion korektos en nia hodiaŭa resumo de novaj stampoj.

---

**Anonco:**
Ankoraŭ restas kelkajn ekzemplerojn de Esperanto-poŝtmarka katalogo el 1967:
Gi kostas 10 IRK + afranko
Vi povas pagi al la stampa banko aŭ al Paulsson.




*1981 – 66ª U.K.*
*Braziljo – BRAZILO*








**Kluba informilo de ELF-AREK**
**Esperanto Ligo Filatelista**
**Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj**

**Redaktoro:**
Rudolf Burmeister, DDR 9047, Karl-Marx-Stadt, W.-Firl-Str. 30

**Prezidanto:**
Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3. Poŝtkonto: 51 57 85-4

**Stampobanko:**
Werner Heimlich, D-3040 Soltau, Fröbelstr. 4

**Kotizo por 1981:**
15 validaj IRK (maldekstre stampitaj!) aŭ 36 svedaj kronoj.
Prefere sendu la monon al s-ro Paulsson.
Redaktoro ne akceptas kotizojn!

